

IO STULTA

(C. Carson Parks)

Esperantigo E. Rovere

Mi tenos vin ĉe l'telefono ĝis vi diros "kunestos ni dum vesper",
sed timas mi, ke, por vin akompani hejmen el dancejo, vanas l'esper'.
Prefere en drinkejo ĉarma sidos, frandos glason ni da dolĉa vin'
kaj poste ĉion fuŝos mi, dirante ion stultan kiel "mi amas vin".

Jes, mi scias, ke vi malestimas preskaŭ ĉion, kion faras mi por vi;
vi volas nur novaĵojn kaj vi diras, ke al mi eĉ mankas fantazi'.

Senĉese mi baraktas por elpensi por vi frazojn de belega signif',
sed poste ne kuraĝas ilin diri, eble taŭgus kelka nova modif'.
Perfektas nun l'etos', magia nokt', parfum' de floroj ebriigas min,
sed eble ĉion fuŝos mi, dirante la stultaĵon, ke mi amas vin.

Senĉese mi baraktas por elpensi belajn frazojn plensignifajn por vi,
sed poste ne kuraĝas ilin diri, restas ili, do, kaŝitaj en mi.
Perfektas nun l'etos', magia nokt', parfum' de floroj ebriigas min,
sed eble ĉion fuŝos mi, dirante la stultaĵon, ke mi amas vin.

Mi amas vin, mi amas vin...